# TEA-BULTENO

5$^{a}$ JARO MAJO - JUNIO 2002 NUMEROJ 5-6

## PROGRAMO EN TEA - MAJO

| | |
|---|---|
| Ven 03 | Niaj aranĝoj – Diapozitivoj de Anita |
| Mar 07 | Ni parolu Esperante! |
| Ven 10 | Je la 18,30 - Estrarkunsido<br>Kartludado – Rumio kaj Trisepo |
| Mar 14 | Ni parolu Esperante! |
| Ven 17 | Novaĵoj el Esperantio |
| Dim 19 | En Udine - Esperantlingva Diservo<br>Informoj ĉe Tea-sekretario |
| Mar 21 | Ni parolu Esperante! |
| Ven 24 | Diapozitivoj pri nia pasinteco |
| Mar 28 | Ni parolu Esperante! |
| Ven 31 | Alp-Adria Konferenco en Rijeka |

## Majaj Okazaĵoj en Esperantujo

KROATA ESPERANTO-LIGO kunlabore kun ESPERANTO-SOCIETO RIJEKA organizas en Rijeka, Kosterna, de la 31$^{a}$ de majo ĝis la 2$^{a}$ de junio 2002 la jenajn aranĝojn:

- 5$^{a}$ Kongreso de Kroataj Esperantistoj
- Mezeŭropa Konsultiĝo
- Kroatia Konkurso pri scio de Esperanto por elementlernejanoj... kaj
- **14$^{a}$ Alp-Adria Esperanto-Konferenco.**

Tiu ĉi interplektiĝo de kvar diversaj kunvenoj certe estos tre interesa kaj enhavoriĉa, tial tuj kaptu ĉi ŝancon kaj aliĝu al nia tradicia ĉiujara konferenco de Alp-Adria esperantistaro.

Jen kelkaj priaj klarigoj:

➤5$^{a}$ Kongreso de Kroataj Esperantistoj: ĝi okazos sabate la 1$^{an}$ de junio, kun ĝenerala kunveno kaj kultura programo.

➤Mezeŭropa Konsultiĝo: kunveno de prezidantoj kaj sekretarioj aŭ estraranoj de Esperanto-Asocioj de Mezeŭropo, nome de Aŭstrio, Ĉeĥio, Hungario, Kroatio, Pollando, Slovakio kaj Slovenio.

➤Kroatia Konkurso pri scio de Esperanto por la lernantoj de elementaj lernejoj, kie la lingvo estas instruata. Tio okazos en Vilao AMFORA.

| Aliĝkotizo | | |
|---|---|---|
| Konferencano | € 20.00 | kunaoj 148.00 |
| Kunulo | € 10.00 | kunaoj 74.00 |
| Junulo (malpli ol 27-jara) | € 10,00 | kunaoj 74.00 |

Kromajn informojn pri loĝado, ekskursoj, kunveturo ktp donas TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO - tel 040 763128 (ĉiu-marde kaj -vendrede ekde la 19$^{a}$ ĝis la 22$^{a}$ horo) aŭ retpoŝte: esperantotrieste@adriacom.it – nored@estranet.it

Tiu serio da aranĝoj certe jam tiklis vian interesiĝon, sed... ĉu la tuto estos tiom pli alloga, se sekrete kaj kaŝe mi susuras, ke okaze de ĉi tiuj renkontiĝoj aperos filatelaĵoj priesperantaj? Kolektemuloj kaj filatelistoj, ne perdu ĉi okazon pliriĉigi viajn posedaĵojn per tre grava esperantaĵo!

Do, ĝis revido al ĉiuj en Rijeka!!!

## Provizora Programo

| Vendrede, la 31$^{an}$ de majo | |
|---|---|
| 12.00-18.00 | Alveno – Akcepto |
| **16.00-18.00** | **Kunsido de Alp-Adria Kunordiga Komitato** |
| 16.00-18.00 | Mez-Eŭropa Konsultiĝo (estraranoj de landaj asocioj) |
| 18.00-20.00 | Vespermanĝo |
| 20.00 | Interkona vespero |
| **Sabate, la 1$^{an}$ de junio** | |
| 09.00-10.30 | Mez-Eŭropa Konsultiĝo |
| **09.00-10.00** | **Malfermo de la 14$^{a}$ Alp-Adria Konferenco** |
| 09.00-12.00 | Ekzamenoj por partoprenantoj en konkurso por lernantoj |
| 11.00-14.00 | Programo de la 5$^{a}$ Kongreso de kroataj esperantistoj |
| 14.00-15.00 | Tagmanĝo en Rijeka |
| 14.00-18.00 | Trarigardo de urbo Rijeka por elementlernejanoj |
| 15.00-18.00 | Kulturaj programoj kaj prelegoj |
| 19.00-20.00 | Vespermanĝo |
| **Dimanĉe, la 2$^{an}$ de junio** | |
| 08.30-09.30 | Diservo |
| **09.30-10.30** | **Fermo de la konferencoj kaj aranĝoj** |
| 10.30-15.00 | Ekskurso kun tagmanĝo al montara regiono Lokve kaj Fužine |

## Agado de UEA kaj EEU kontraŭ la lingva diskriminacio en internaciaj organizoj.

***UEA plendas ĉe Eŭropa mediatoro Jacob Soderman***

Eŭropaj organizoj rezervas pli kaj pli da postenoj, oficiale malfermitaj al ĉiuj civitanoj, al denaskaj parolantoj de la angla. Nur tiuj homoj, kiuj denaske scipovas la anglan, ĉu apartenantaj al sociaj elitoj, ĉu apartenantaj al anglalingvaj nacioj kaj landoj, povas kandidatiĝi por multaj postenoj Eŭropaj kaj en internaciaj organizoj. "Ni nun havas liston de 400 diskriminaciaj dunganoncoj fare de Eŭropaj organizoj kaj firmaoj en Bruselo. En la tuta mondo estas multe pli da tiaspecaj anoncoj," klarigas Renato Corsetti, la prezidanto de UEA.

Eŭropa Komisiono agnoskas la juran problemon. "Postuli denaskan scipovon de la angla povas esti konsiderata kiel diskriminacia," opinias Anna Diamantopoulou, membro de Eŭropa Komisiono respondeca pri laboro kaj egalaj ŝancoj. Respondante al demando de itala Eŭropa parlamentano Vitaliano Gemelli, ankaŭ membro de Eŭropa Komisiono Viviane Reding, respondeca pri kulturo kaj edukado, agnoskis kazon de lingva diskriminacio ĉe la Komisiona oficejo por la Eŭropa programo Sokrates, Leonardo kaj Junularo. Laŭ UEA, lingva diskriminacio estas grava atako kontraŭ la dua artikolo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

UEA bedaŭras ke Eŭropa Komisiono ĝis nun oficiale nur agnoskas respondecon por Teknikaj Helpoficejoj, organizoj rekte dependaj de la Komisiono. "Tamen Eŭropa Komisiono financas amason da Eŭropaj organizoj kiuj regule dunganoncas nur por denaskaj parolantoj de la angla." Ekde du jaroj, UEA kune kun Eŭropa Esperanto-Unio (www.lingvo.org) sekvas lingvan diskriminacion ĉe internaciaj organizoj kaj firmaoj. Multaj dunganoncoj por denaskaj parolantoj de la angla estas faritaj de Eŭropaj organizoj financitaj plene aŭ parte de Eŭropa Komisiono. Preskaŭ neniam aperas dunganoncoj por denaskaj parolantoj de aliaj lingvoj.

"Spite al multaj neoficialaj plendoj en la Eŭropa Parlamento, Eŭropa Komisiono ankoraŭ financas amason de Eŭropaj organizoj en Bruselo, kiuj rezervas postenojn por denaskaj parolantoj de la angla," diras Corsetti. "Ekde la komenco de la jaro, kvindeko da gravaj Eŭropaj organizoj rezervis postenojn por denaskaj parolantoj de la angla. Inter ili estas eĉ oficiala servo de Eŭropa Komisiono - la projekto JEAN MONNET - kiu promocias la Eŭropan ***spiriton*** ĉe universitatoj."

Pasintjare, dum la Eŭropa Jaro de Lingvoj, klare sonis kondamnoj de lingva diskriminacio, interalie de la belga ministrino Laurette Onkelinx, respondeca pri egalŝancoj, kaj diversaj anoj de Eŭropa Komisiono (listo de parlamentaj demandoj). Tamen la praktiko daŭras en 2002 kaj Eŭropa Komisiono daŭre financas tiajn organizojn en Bruselo, kiuj rezervas postenojn por denaskaj parolantoj de la angla. Nun la prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, prof-ro Renato Corsetti oficiale plendas pri lingva diskriminacio al la Eŭropa Mediatoro, Jacob Soderman (www.euro-ombudsman.eu.int). "La ĉefa celo de la oficiala plendo estas kontraŭi diskriminacion surbaze de la denaska lingvo fare de internaciaj organizoj, t.e. la postulo ke kandidatoj denaske scipovu la anglan."

"Multaj politikistoj ne volas neŭtralajn kaj egalajn solvojn kiel, ekzemple, Esperanton. Tamen ili devas respondi al kaj respondeci pri la kreskanta problemo de lingva diskriminacio kontraŭ nedenaskaj parolantoj de la angla," klarigas Corsetti. Li tute ne estas kontenta ankaŭ pri la lasta respondo E-3572/01 de Anna Diamantopoulou, ano de Eŭropa Komisiono respondeca pri sociaj aferoj. "Ŝi nun permesas al Eŭropaj organizoj postuli "English mother tongue or equivalent" (La angla denaske aŭ samnivele). Kompreneble, tio estas la samo kaj fakte signifas, ke Eŭropaj organizoj nun nur invitos denaskajn parolantojn de la angla."

La plendo pri lingva diskriminacio fare de Universala Esperanto-Asocio celas ke la Eŭropa Komisiono:

1) agnosku la diskriminacian naturon de diverstipaj dunganoncoj, kiuj estas oficiale malfermataj al ĉiuj civitanoj, sed neoficiale rezervataj al denaskaj parolantoj de la angla ["English mother tongue", "English native speaker", "English mother tongue or equivalent", ktp];
2) certigu ke ĝi ne plu financos tiujn organizojn kaj firmaojn, kiuj diskriminacias kontraŭ nedenaskaj parolantoj de la angla;
3) studu kaj esploru rimedojn kaj metodojn eviti lingvan diskriminacion fare de organizoj plene aŭ parte financitaj de ĝi.

La oficiala plendo ĉe la Eŭropa Mediatoro rilatas nur al tiuj dunganoncoj, kiuj postulas denaskan scipovon de la angla. "Tamen eĉ pli da Eŭropaj organizoj, kaj centoj da firmaoj laborante kun Eŭropa Komisiono en Bruselo, postulas ***perfektan*** scipovon de la angla kaj poste nur invitas denaskajn parolantojn de la lingvo de Ŝekspiro," klarigas Corsetti. Eŭropa Komisiono ankoraŭ insistas ke lingva diskriminacio fare de Eŭropaj organizoj, eĉ se plene financataj de Eŭropa Komisiono, estas ***nur*** belga problemo pro tio ke Eŭropaj organizoj kaj firmaoj estas konstituataj laŭ belgaj leĝoj. "Oficistoj ĉe Eŭropa Komisiono bone komprenas, ke belgaj inspektoroj havas nek monon nek tempon por solvi la problemon de lingva diskriminacio fare de Eŭropaj organizoj en Bruselo."

Por pli da informoj, listo kaj ekzemploj de dunganoncoj bv. kontakti:

Dafydd ap Fergus
Komunikadcentro de Eŭropa Esperanto-Unio
(www.lingvo.org; kontakto@lingvo.org)

**Nova oficisto en la Centra Oficejo** - La 32-jara Joost Witteveen (Nederlando) eniris la teamon de la Centra Oficejo de UEA kaj TEJO en Roterdamo. Doktoro pri fiziko kaj sperta komputilisto, li prizorgos kaj modernigos la komputilaron.

### *Junaj Afganaj Korespondemuloj*

Esperanto-lernantoj de la projekto LINGVO DE PACO (rifuĝintaj en Irano el Afganio) deziras korespondi tutmonde, aŭ eĉ nur ricevi kuraĝigan bildkarton:

→F-ino Mojhgan Vatanpur (20-jara), Tabage 3, Buluk-e 2, Shahrak-e Seyd ol Shohada, Kh: Babai, Yaft Abad, Tehran, Irano

→S-ro Esmail Vakili (15-jara), NO:4, K: 4 Garbi, Kh: Fakuri, Ashrafi Esfahani, Punak, Tehran, Irano.

→S-ino Malihe Vakili (21 jara), NO:4, K: 4 Garbi, Kh: Fakuri, Ashrafi Esfahani, Punak, Tehran, Irano.

# *Mallonge pri...*

❋ En haveno Sharm el Sheikh, Egiptio, troviĝas **ŝipo**, kies nomo estas **Esperanto**. Demandante la maristojn oni ricevas plurlingvan (ankaŭ en Esperanto) flugfolion.

❋ Aperis turisma broŝuro pri Valencia, en Esperanto, bunta kaj bele presita. Se iu deziras ricevi ĝin, bonvolu kontakti la turisman oficejon de Valencia. Jen la adreso:

Oficina de Turismo - Plaza Ayuntamiento, 1
46001 Valencia - Hispanio
Tel. 96 351 04 17; turisvalencia@turisvalencia.es
http://www.turisvalencia.es/

❋ Aŭtonoma Registaro de Katalunio eldonis turisman broŝuron, 16-paĝan, grandformatan (45x30), bele ilustritan, en kvin lingvoj, inter kiuj Esperanto. Petu senpagan ekzempleron al la jena adreso:

S-ino Cap de Seccio de Publicacions
Direccio General de Turisme, Generalitata de Catalunya,
ES-08080 Barcelona - Hispanio
Retadreso: mllanos@correu.gencat.es
*inf: luis_serrano@e-milio.com*

❋ **TTT-ejo de Esperanto-Asocio en Parma**
Danke al kunlaboro kun s-ino Patrizia Garbesi, ekde nun eblas viziti nian retejon:

http:///web.tiscali.it/esperantoparma

Estas bonvena ties diskonigado, kune kun kritikoj kaj sugestoj por ĝin plibonigi. Informis:

Vittorio kaj Luisa Madella - via Prampolini 8
It-43100 Parma tel./faksilo: +39 0521 785582
retadreso: pianetaurano@libero.it

❋ La estraro de ITALA INSTITUTO DE ESPERANTO decidis starigi Katedron de Esperanto en la urbo *Brescia*. Ĝi rajtas aranĝi kursojn por komencantoj, por progresintoj kaj por instruontoj. La elektita instruisto estas Glauco Corrado. Por informoj:

d-ro Luigi Fraccaroli, sekretario de Breŝa E-Grupo,
via Crocifissa di Rosa 63, IT-25128 Brescia
tel. +39030306809; esperanto.brescia@libero.it

❋ Inaŭguro de LERNEJO DE ESPERANTO
La $19^{an}$ de januaro malfermis la pordojn LINGVA, profesia lernejo de Esperanto. La lernejo, kun ĉiaj modernaj poredukaj rimedoj (videoaparato, KD-oj, ktp) situas en la urbo San-Paŭlo, Brazilo.

LINGVA - R. 7 de Abril, 235, cj.
107 San-Paŭlo, Brazilo

❋ **Intervjuo en slovaka televido**
La tutlanda slovaka informa TV-kanalo TA3 (simila al CNN) faris intervjuon kun Stano Marček, redaktoro de la revuo ESPERANTO, pri niaj lingvo kaj movado. Ĝi estis elsendata la $14^{an}$ de aprilo ($85^{a}$ datreveno de la morto de L.L. Zamenhof), ĉiun duonhoron, dum la tuta tago, enkadre de la ripetataj TV-novaĵoj.

❋ **Trilingva poŝtkarto**
Estis eldonita poŝtkarto kun Esperanto, franca kaj angla teksto okaze de la 30-jara datreveno de ekflugo de la supersona flugmaŝino CONCORDE. La poŝtkarto estis eldonita en nur 500 ekzempleroj. Ĝi aperis eĉ en la internacia kolekto de poŝtaĵoj. Pliaj informoj ĉe:

Andre Nestasio - 1 place de l'Eglise Saint Gervais,
FR-76000 Rouen, Francio

❋ **Esperanto-monumento, -placo, -kafejo!**
Indas foje fari ekskursan viziton al ZEO-j en Graz, Aŭstrio. Ne estas vaste konate, ke urbocentre, en la Placo Esperanto, staras la Jubilea Monumento de Esperanto (Paul Neergaard, 1987), kaj tuj flanke malfermiĝis ankaŭ KAFEJO ESPERANTO.

❋ **Esperanta ekspozicio por infanoj en Nankino**
La Tria Esperanto-ekspozicio por Infanoj okazos en Nankino la $1^{an}$ de junio 2002, ĝuste okaze de la Internacia Infana Tago. Ili esperas ricevi gratul-leterojn, poŝtkartojn, fotojn kaj aliajn esperantaĵojn el la tuta mondo. Ilin sendu al la jena adreso: Zhuang Rui , 402/14 Jiao Fu Yin, Fuzimiao, Nanjing CN-210001, Jiangsu, Ĉinio aŭ retadreso: zhuangespero@163.com

## Grava evento en la E-movado de Irano

La $3^{an}$ de februaro 2002 la ministerio pri kulturo en Irano oficiale rajtigis la aperigon de la trimonata gazeto PAYAME SABZANDISHAN (Mesaĝo de Verdpensularo), kies posedanto kaj respondeca direktorino estas s-ino Fariba N. Majd. Ĝi estas la unua dulingva, Esperanto-Persa, gazeto ne nur en Irano sed en la tuta mezoriento!

La proceduron por akiri oficialan permesilon pri la eldonado de dulingva gazeto, oni komencis antaŭ kvar kaj duona jaroj kaj finfine post esploroj, duboj kaj diskutoj s-ino Fariba N. Majd estis rekonita kiel posedanto de la revuo. Menciindas, ke ŝi estis vicprezidantino de IREJO (Irana E-ista Junulara Organizaĵo) kaj kunfondantino de la Irana Esperanto-Centro. Tio estas gravega akiro, historia evento por la tiea de E-movado!

Esperantistaro atendu baldaŭan aperon de tiu unua Esperantaĵo el Irano! Bonvenas gratulmesaĝoj al la respondeca direktorino:

Fariba N. Majd - N. 79, Kh: Gasemzade
IR- 1741894941 Tehran-Nov - Irano

## NOVAJ RETADRESOJ

Ekfunkcias novaj retadresoj de la oficistoj en la Centra Oficejo de UEA/TEJO. Dank' al la nova sistemo ekde nun oni uzos ne unu komunan retadreson, konstante plenŝtopatan per plurtemaj mesaĝoj, sed eblos senpere atingi la konkretajn respondeculojn.




La plej gravaj novaj adresoj estas la jenaj:

**direktoro@co.uea.org** - ĝeneralaj demandoj pri administrado de UEA.
**libroservo@co.uea.org** - mendoj de libroj de la UEA-libroservo.
**sekretario@co.uea.org** - adresŝanĝoj, aliĝoj, informoj.
**kongresoj@co.uea.org** - ajnaj demandoj pri UK.
**uk.mendoj@co.uea.org** - mendoj de hoteloj, ekskursoj, flugoj por UK.
**financoj@co.uea.org** - demandoj pri pagoj, kotizoj k.s.

Kaze de iuj misfunkcioj bonvolu uzi la adreson **admin@co.uea.org**.

La komuna adreso por UEA restas la antaŭa **uea@inter.nl.net** - kiu nun ekvivalentos al la nova adreso **uea@co.uea.org** kaj la poŝto de ambaŭ venos al la sama poŝtkesto.

## Unua hejmpaĝo pri Raymond Schwartz?

«Li estas vere la TERURA INFANO de la Esperanta familio: nenio restas kaŝita antaŭ li kaj nenion li indulgas, kiu aŭ kio estas inda je grimaco aŭ pinĉo. Sed pinĉante per moko, samtempe li tiklas per sprito, tiel ke la pinĉito mem devas ridi anstataŭ indigni.», tion skribis Kalocsay pri la plej granda humuristo de la Esperanta mondo, **RAYMOND SCHWARTZ** (1894-1973). Ne trovinte en la reto referencojn pri la aŭtoro, brazila leganto starigis la TTT-ejon **http://go.to/kabareto** kiel etan omaĝon al la rido kaj vervo... eh... vivo kaj verko de nia fama vortludisto.


## Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso

La 5ª Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso okazos inter la 23ª kaj 28ª de aŭgusto 2002 en Verona, Italio. La ĉeftemo de la kongreso estas EFEKTIVA LINGVA EGALECO: RAJTOJ DE LA EŬROPANOJ. La aranĝo estas oficiala kunveno de EŬROPA ESPERANTO-UNIO, EEU, sed kompreneble ne nur la reprezentantoj de la membro-asocioj rajtas partopreni ĝin. Dum la kongreso estos komitatkunveno de EEU. Oni povas ĝui diversajn, interesajn prelegojn pri la ĉeftemo kaj pri temoj, kiuj estas gravaj kaj interesaj por homoj, kiuj vivas en Eŭropo.

GRUPPO ESPERANTISTA VERONESE «L. L. RENI»

Pliajn informojn kaj aliĝilojn petu al:
Verona Esperanto-Grupo
CP 1616, IT-37100 Verona, Italio
Rete: esperantoverona@adriacom.it

## IFEF-KONGRESO



La 54ª Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio okazos de la 1ª ĝis la 7ª de junio en Plovdiv, Bulgario. La programo antaŭvidas la kutimajn, valorajn, fakajn prelegojn kaj diskutojn. Krome atendas la partoprenantojn interesaj distraĵoj kaj ekskursoj.

Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe:
LKK de 54ª IFEF-Kongreso
Centra Poŝto, pk. 455, BG-4000 Plovdiv, Bulgario
Rete: bdz-intrel@bbf.bg



## Internacia E-Muzeo, Vieno

La ekzisto de la elektronika katalogo TROVANTO de la Internacia Esperanto-Muzeo en la Aŭstria Nacia Biblioteko dependas entute de la vizitoj de esperantistoj al tiu retpaĝo. Regule vizitu ĝin, aŭ, kontraŭe, la katalogo riskos malaperon. Jen la ejo: http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm

*Inf: Mag. Helga retadreso: Helga.Farukuoye@onb.ac.at*

## Mi jam balotis por Zamenhof! Kaj vi?

Ĉe TTT-ejo, oni voĉdonas por konataj gravaj judoj. En la kategorio «Inventistoj kaj Inĝenieroj» troviĝas la nomo (kun nur unu alia!!!) de nia L. L. Zamenhof. Se vi iros al paĝo http://www.yahoodi.com/famous/invent1.html vi povas voĉdoni por li (aŭ por la alia, se vi tion preferus...).

## *Kvizo, TEA-Bulteno de marto-aprilo 2002*

**En kiu jaro iĝis la verda stelo simbolo de Esperanto?**

Solvo de la Kvizo: En la jaro 1905.

Ĉu ne indas eta, supraĵa, rigardo al ties historio? Jen kion mi trovis, trafoliumante, tie kaj ĉi tie, la ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO - 1933.

Skribis E. Wiesenfeld sub la vorto *insigno*:

"... Pri la kvinpinta stelo, ŝajnas al mi, ke unue ĝin presigis sur sia gramatiko s-ro de Beaufront. Tio plaĉis al mi kaj mi prenis tion kiel signon. Poste per asociado de la ideoj aperis stelo kun verda koloro." (el letero de Zamenhof, publikigita de THE BRITISH ESPERANTIST en 1912)

"...Kiel ion tute oficialan ni devas tamen konsideri la jenan fakton. Sur la paĝo 24 de la Kajero Unua (aŭg. 1906) de la E-ista Dokumentaro, t.e. en la oficialaj dokumentoj pri la UK 1905 ni legas inter la decidoj: «...1, oni akceptas kiel universalan E-an flagon, la flagon de la Boulogne-a Grupo (verda tuko) longa je 1.20 metro, kun maldekstra supra angulo blanka (0,50x0,50) kaj sur tiu ĉi blankaĵo, verda stelo.» Konklude ni devas rekoni: la unua, kiu ĵetis la ideon pri int. komuna signo esperantista, estis B. G. Jonson el Ostersund en 1892; la unua, kiu ĵetis la ideon pri verda koloro kaj pri stelo estis L. de Beaufront en 1893. Kiu prezentis la unua la verdan stelon, tian kia ĝi estas nun — je tiu demando ni restos plej certe sen respondo."

Ĉiam pri la sama temo, tamen legeblas sub la vorto *Calais*, ke la 7ªⁿ kaj 8ªⁿ de aŭgusto 1904, tiu franca urbo gastigis la unuan, iom gravan, internacian kunvenon de esperantistoj. Fakte la loka grupo, kunlabore kun tiu de la angla urbo Dover, organizis, okaze de kurado de "aŭtomobilaj boatoj" aranĝita de Aŭtomobila Klubo de Francio, internacian Esperanto-feston. Dum la kongreso oni "...diskutis la demandojn: 1. Pri la akcento tonika ... 2. Pri la ortografio de la personaj kaj urbaj nomoj. 3. Pri E-ista signeto; oni decidis: «La signo de la rekono por la E-istoj, kiun oni rekomendas por la kunvenoj k.c., estas la verda kvinpinta stelo.» ..."

Ĉu iu el vi scias ion pli pri nia insigno? Scivoleme mi atendas viajn kromajn informojn.

## ⇨ Kvizo ⇦

**Kion signifas Pasporta Servo?**

1. Oficejo, kie membro de Esperanta Civito ricevas pasporton;
2. Gastiga reto de esperantistoj;
3. Servo de UEA por sendi invitleteron al UK al partoprenantoj el nepagipovaj landoj.

**Kie kaj kiam la unuan fojon parolis Esperante papo Johano-Paŭlo la dua?**

1. Roterdamo - 1991; 2. Romo - 1994; 3. Czestochowa - 1991.

**Inform-artikoloj ŝuldeblas al RET-INFO, NUN KAJ NOVA SENTO.**


**BULTENO** de la membroj de
**TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO**
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
Tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperantotrieste@adriacom.it; nored@estranet.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349